

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj » numero 1

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

La Kalumeto

Kia lumeto estas kalumeto, vi eble demandas. Replike, ni povas diri ke Kalumeto estas la “lumeta” kontaktilo/diskonigilo de PIP. Pro tio ke la komencliteroj “pip” pensigas al oni pri pipo, kaj pro tio ke la kalumeto estas la paco-pipo de la indianoj de Nordameriko, oni facile (?) konstatas ke Kalumeto taŭga nomo por nia komunikilo. Ĉu iu deziras proponi alian nomon? Sub iu ajn nomo, ni sekvu la koncepton de la kunfumado de la originala kalumeto: pacaj kunvivado kaj kunlaboro.

Kontaktoj

PIP petas al ĉiuj subtenantoj ke ili informu al (S-ro) Erik Felker pri indiĝenaj popoloj, grupoj, organizoj, kaj tiel plu, kaj pri novaĵoj koncerne tiujn popolojn kaj grupojn. PIP bezonas kontakti ĉiujn el ili por klarigi al ili kiel Esperanto kaj ĝi povos servi ilin.

Ankaw PIP serĉas tradukojn en Esperanton de indianaj lingvoartoj, por aperigo en ĉi tiu kontaktilo, por la kolekto kiun ni faras ĉe la “Yahoo list” indiĝenaj_popoloj, kaj aliel.

La (Ne-) Deklaro

Lamentinda kaj mallaŭdinda estas la flankenmeto de la Deklaro de la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj fare de la UNO.

Tamen, ni ne tre surpriziĝu. La registaroj de pluraj landoj plene konscias ke se indiĝenaj popoloj akiros pli da rajtoj, la politikaj, ekonomiaj, kaj sociaj vivoj de tiuj landoj iugrade ŝanĝiĝos. Registaroj kaj socioj neofte ŝanĝiĝemas. La nuna rezulto: rifuzo.

Sed ni PIP-subtenantoj kaj multaj aliaj homoj ne forgesu la artikolon tri de la Deklaro, kiu celas informi al ĉiuj ke indiĝenaj popoloj rajtas je aŭtonomeco: ili rajtas libere decide pri sia disvolviĝo ekonomia, socia, kaj kultura. Ni ne forgesu tion, kaj ankaw ni ne ĉesu labori subtene je ĝi.

Kanto de la Tondrobirdo
(de la tribo “ĉipeŭa” ed Usono)

Aŭskultu la bruegon!

La potencaj Tondrobirdoj alproksimiĝas al ni.

Aŭskultu iliajn voĉojn!

La fulma eklumo estas la glimbrilo
de iliaj teruraj okuloj;

La sonegado en la ŝturma ĉielo estas la flugiloj
de la Tondrobirdoj.

(American Indians Sing, Charles Hoffman)

“Merga Metodo” por Indianaj Lingvoj

Du indianaj triboj en Usono uzas la tielnomitan “mergan metodon” por instrui al la propra anaro sian preskav perditan lingvon.

La triboj “Onajda” kaj “Mohak” nun uzas la merga aw rekta metodo ne nur por sialingve paroligi la lernantojn, sed ankaw por pensigi ilin per la indiĝena lingvo. La konata lingvoinstrua firmao Berlitz profesie uzas la rektan metodon por instrui plurajn lingvojn; por instrui la onajda, Berlitz trovis en Kanado parolanton de tiu lingvo, instruis al li la “berlitz-an” metodon, kaj venigis lin al la onajda grupo en Usono kiu deziris lerni tiun lingvon parole kaj skribe.

La ĉirkaŭaj lernejoj, kiuj iom instruas anglalingve pri la onajda kulturo, nun interesiĝas ankaw pri instruado de la onajda lingvo!

Resume, jen citaĵo de S-ino Sunny Shenandoah, kurso-partoprenanto, relate je ŝia lernado: “Mi fieras pri mi mem”.

Jen la unua numero de Kalumeto. Eble vi rimarkis ke preskav la tuta enhavo temis pri la indianoj de Nordameriko. Ti one estis law la deziro de la verkanto, sed pro la fakto ke li bezonas informojn pri kaj el diversaj lokoj. Do, mi petas al vi, legantoj, ke vi partoprenu por ke ĉi-tiu kontaktilo/diskonigilo iĝu pli informa kaj ĉiel pli leginda.

Elkore salutes vin nome de PIP
(S-ro) Erik Felker

ejfelker@dslextreme.com